- Saluton, fraŭlino! Mi alflugis el Berlino je la unua horo. Mi atendis mian valizon (kofron) tre longe, sed ĝi ne alvenis.
- En la nomo de nia flugkompanio mi petas vian pardonon. Tuj mi ordonos, por ke miaj kolegoj serĉu ĝin. Diru vian nomon! Kie vi loĝas?

- Mi estas Ede Végh. Mi loĝas en Hotelo Eŭropo. La numero de mia ĉambro estas 345.
- Mi informos vin per telefono. Se ni ne trovos vian valizon, tiam ni povos doni kompensagon nur post monato. Ni kalkulos la tempon ekde la konfirmo de perdo.
- 

1. Kiam kaj el kiu urbo alvenis Ede?
  2. Kion li ne trovis?
  3. Kion diris al li la fraŭlino en la aerodromo?
  4. Pri kio ŝi informis lin?
- 

## E) PRI AŬTOBUSBILETOJ KAJ MALFRUIĜO

Karlo: – Saluton, Petro! Vi laboras en nia urbo jam du semajnojn. Kiel vi fartas? Ĉu ĉio estas en ordo? Kia novaĵo estas nun en via patrujo, Germanio?

Petro: – Saluton, Karlo! Kiom da demandoj! Nun mi estas tre malĝoja, ĉar hieraŭ kontrolisto punis min, kiam mi veturis en aŭtobuso al mia amiko.

Karlo: – Ĉu vi ne havis bileton?

Petro: – Ne, ĉar mi ne sciis, kie oni vendas biletojn.

Karlo: – Volonte mi estus doninta al vi biletojn. Vi povas aĉeti ilin en magazenoj, eĉ ĉe la ŝoforo. Poste vi devas perfori la bileton. Aĉetu monatan bileton (abonbileton)!

Petro: – Nun jam mi scias. Mi havas dek biletojn. Mi aĉetis ilin antaŭ kelkaj minutoj ĉe surstrata vendisto.

Karlo: – Ankaŭ mi rakontos al vi, kio okazis al mi hodiaŭ matene. Mi malfruis dek minutojn.

Mi kaj la pordisto interparolis jene:

Karlo: – Pardonu min, mi malfruis, ĉar mi devis solvi mian grandan problemon. Mi devis akompani (veturigi) mian filon al la lernejo, ĉar malsaniĝis mia edzino.

Pordisto: – Mi komprenas vian problemon, tamen mi devas informi nian ĉefon pri via malfruigo.

Karlo: – Bonvolu ne fari tion! Vi konas min bone. Mi malfruigas neniam. Tio estis eksterordinara situacio.

Pordisto: – Bone. Tio estu via unua kaj la lasta malfruigo!

---

1. Kial Petro ne aĉetis autobusbiletojn?

2. Kie li povas aĉeti autobusbiletojn?

3. Kial punis lin la kontrolisto?

4. Kial malfruigas Karlo?

5. Kion diris al li la pordisto ?

#### VI. TRADUKU EN ESPERANTON!

1. Meg tudnád oldani egy problémámat? 2. Tegnap este, amikor a tévét néztem, a fiam éppen újságot olvasott. 3. Megkérdeztem, hogy megcsinálta-e már a házi feladatát matematikából. 4. Természetesen azt válaszolta, hogy igen. 5. Sohasem mondtam neked, hogy nyaralni megyünk a Balatonra. 6. Valahol, valamikor már találkoztunk. 7. Bárki mondta neked, felejtsd el! Sehol sem találtam őt. 8. Jobb későn, mint soha. 9. Senki (nenies) véleményét nem fogadom el vakon (blinde). 10. Sohasem láttam Péter fiát. 11. Valahogyan meg kell találnom a házát. 12. Szüleim ebben a házban laktak a második világháborúig. 13. Milyen könyv ez? Ez egy

érdekes könyv. *(Ha melléknévvel kérdezünk, melléknévvel válaszolunk. A KIU kérdésre a könyv címe a válasz.)* 14. Melyik (milyen) könyv ez? Ez a könyv az Egri csillagok. 15. Mindenütt kerestelek. 16. Jó emberek mindenhol vannak. 17. Az eszperantisták mindenhol találnak barátokat. 18. Mindent megteszek érted. Érted? 19. Miért tanulsz eszperantóul? 20. Egyszerű, logikus, nemzetközi nyelv, és szükséges a diplomámhoz. 21. Nem haragudnék, ha megmondtad volna, hogy nem tudsz eljönni. 22. Lefordítanám a szöveget, de nincs szabadidőm. 23. Minden jót kívánok neked. 24. Mennyi almát akarsz? 25. Az összeset. 26. Nem tudok annyit, amennyit te. 27. Akinek a zsebe üres, annak az élete szomorú. 28. A fiúk megvárták volna Klárát, ha lett volna idejük. 29. Bárhogyan lesz, meg kell látogatnom Péteréket. 30. Tetszett nekem, ahogyan elmesélted az életed. 31. János erkölcstelen könyveket olvas. 32. Ott megy Éva volt férje. 33. A rossz idő ellenére holnap kirándulunk. 34. Bocsánat, tudna segíteni nekem? 35. Kérem, ne tájékoztassa a főnököt arról, hogy elkéstem. 36. A házhoz szállítás a megvásárolt áruk összegétől függ. 37. Hozzanak nekem két üveg bort, két kiló kenyeret, három doboz margarint és egy kiló cukrot. 38. Bármilyen az idő, pontosan érkezem. 39. Mitől függ a lakásbiztosítás díja? 40. A díj a lakás nagyságától függ. 41. Milyen háziállataitok vannak? 42. Vannak tyúkjaink. 43. Ezen kívül van négy disznók, két kutyánk, két macskánk, egy pulykánk, öt házinyulunk, négy libánk, két lovunk, három csikónk, két tehenünk és két borjúnk. 44. Az ön lakása biztosítva lesz felhőszakadás, árvíz, vihar, jégeső, villámcsapás és földrengés esetére (ellen). 45. Néhány perc múlva indulunk síelni. 46. Szeretnék enni egy rántott (gratenita) szeletet krumplival. 47. Én főtt kolbászt kérek. 48. Íme néhány vadállat: rozmár, sakál, teve, farkas, róka, majom, tigris, elefánt, krokodil.

**IX. LERNU SEKVAJN VORTOJN! TANULJA MEG A KÖVETKEZŐ SZAVAKAT!**

sendanĝero biztonság asekuro biztosítás interkonsenti megegyezni gratenita rántott kia ajn bármilyen malgraŭ ellenére humoro kedv agente ügynök ĝoji (pri) örülni asekuri (T) biztosítani dornbesto háziállat kvadratmetro négyzetméter tute egészen, teljesen porkejo disznóól asekurenda biztosítandó -end -andó, -endő ŝafo birka ŝafido bárány virbovo (taŭro) bika bovino tehén koko kakas kokido kiscsirke ĉevalido csikó porkido kismalac kolombo galamb kapro kecske anaso kacsa ansero liba meleagro pulyka pavo páva kuniklo házinyúl azeno szamár mulo öszvér bieno gazdaság blovego vihar hajlo jégeső fulmobato villámcsapás terotremo földrengés inundo árvíz pluvego felhőszakadás rabato kedvezmény fiviro gazember panjo anyuka paĉjo apuka	skilifto sliift finfine végül is aperi megjelenni filozofii filozofálni dumvoje útközben vojo út bufedo büfé sortimento választék hipopotamo víziló serpento kígyó leporo mezei nyúl simio majom kamelo teve urso medve lupo farkas vulpo róka cikonio gólya hirundo fecske pasero veréb fazano fácán fiŝo hal neforgesebla felejtethetlen kio ajn bármi, akármí kia ajn bármilyen, akármilyen skribenda írandó asekurenda biztosítandó sekveda követendő -ĉj férfi becézése -nj nő becézése fi- erkölcssten titolo (könyv-, újság-) cím kombi (T) fésűlni frizisto fodrász opinii (pri) vélekedni najbaro szomszéd sovaĝbesto vadállat enlitiĝi lefeküdni elitiĝi felkelni lito ágyn iam valamikor porkviando (nyers) disznóhús uzino üzem tranokti éjszakázni mendi (T) rendelni	nordo észak sudo dél, travivaĝo élmény okcidento nyugat oriento kelet fakturo számla kvanto mennyiség oleo olaj skatolo doboz botelo palack peco darab bulko zsemle ordo rend hejmenporto házhoz szállítás valizo bőrönd perdi (T) elveszíteni flugkompanio légitársaság ordoni rendelkezeni serĉi (T) keresni kompensago kártérítés konfirmi (T) igazolni aerodromo repülőtér malfruiĝi elkésni kontrolisto ellenőr puni (T) megbüntetni vendi (T) árusítani volonte szívesen bileto jegy perfori (T) kilyukasztani pordisto kapus, portás akompani (T) elkísérni ĉefo főnök eksterordinara rendkívüli nenie sehol neniu senki neniom semennyi neniam sohasem ĉie mindenhol ĉio minden ĉiom valamennyi, összes kornobulko kifli okazi al történni vkivel monata bileto bérlet gvidi (T) vezetni
---	---	--

kunveno összejövetel, gyűlés

**Mi ŝatas rigardi fotoalbumojn, ĉar la fotoj rememorigas min pri niaj somerumadoj ĉe la Balatono, pri niaj eksterlandaj amikoj. Tiam ni estis tre feliĉaj. Ripozi estas pli agrable ol labori. Estu kia ajn vetero, la somero estas mia plej ŝatata sezono. Trinku bieron, manĝu glaciaĵon – tio estas eksterordinara afero. Labori en la ĝardeno, kiam la suno brilas – ankaŭ tio estas neforge-sebla travivaĵo.**

\*\*\*\*\*  
**DEK-DUA LECIONO \*\*\*\*\* TIZENKETTEDIK LECKE**  
\*\*\*\*\*

Debrecenről. Mi történt tegnap? Munkát keresek. A vacak fényképezőgép és az idegenvezető. A garázs-építésről. Pincér úr. Baleset. A pénztárnál. Fővárosunkról, Budapestről. Hivatásomról és a sportról. Lakást cseréltem. Boldogtalan vagyok. Előképző: RETRO-. FOR-. Utóképzők: -ISM, -ER, ING, -AC. Előjárások: TRA, TRANS, SUPER.

## A) PRI LA URBO DEBRECEN

Debrecen estas la dua plej granda urbo en Hungario. Ĝi havas ĉirkaŭ 230 mil loĝantojn. Ĝi estas la „ĉefurbo” de la hungara stepo Hortobágy, kiu situas en la orienta parto de nia lando, laŭ fluo de rivero Tibisko.

Ni retrorigardu (1) iomete! La urbo ricevis urban titolon en 1361. Reformacio (ĝi komenciĝis en 1536) por multaj jardekoj determinis la evoluon de la urbo. Debrecen havis elstaran rolon en la liberigbatalo 1848-49 – ĝi estis la ĉefurbo de nia lando, kaj la registaro mem sub gvido de Ludoviko Kossuth transloĝiĝis ĉi tien. Tiun saman rolon ĝi havis dum kelkaj monatoj en 1944 kaj 1945. **hátra, vissza** **RETRO-**

Ĝiaj vidindaĵoj estas: Granda Preĝejo, Kalvinana Kolegio, urbodomo, Muzeo Déry, Katedralo Sankta Anna, Hotelo Ora Virbovo (Taŭro), strando, banejo, Granda Arbaro. Tie oni povas ripozi: promeni, legi, interparoli, boati, bani sin, rigardi bestojn en zoologia ĝardeno. Tie kaj en aliaj lokoj de la urbo estas kelkaj skulptaĵoj de verkistoj, kiuj naskiĝis aŭ loĝis en nia urbo, ekzemple Endre Ady, Mihály Csokonai Vitéz, János Arany, Sándor Petőfi, Árpád Tóth.

En la Granda Arbaro troviĝas impoza ĉefkonstruaĵo de la Debrecena Universitato. Oni konstruis ĝin en 1933 en novbaroka stilo. Komence de la 2000-a jaro tri universitatoj, kelkaj altlemejoj unuiĝis, kaj ili havas komunan nomon: Debrecena Universitato. En ĝi estas diversaj fakultatoj: ekonomika, filologiscienca, naturscienca, jura, medicina, agrokultura kaj pedagogia. Ĝi estas la plej granda universitato en nia lando, kie studas pli ol 20 mil studentoj.

## B) KIO OKAZIS HIERAŬ?

Hieraŭ mi foriris (2) al mia laborejo je la sepa kaj duono. Mi pensis pri tio, kia estas la kapitalismo (3). Iam mi pensis, ke la kapitalismo signifas riĉecon kaj sendanĝeron. Bedaŭrinde tio ne estas vera. Mi vidas, ke la kapitalismo ne por ĉiuj donas egalajn rajtojn por entrepreni, havi monon. Ekzemple mi havas nur monerojn (4).

– Bonan tagon, sinjoro! Bonvolu montri vian legitimilon! – diris policano.

– Bedaŭrinde mi ne havas ĝin.

– Kial vi ne havas ĝin? Tio ne povas esti. Vi devas kunporti vian legitimilon.

– La afero estas, ke ĝi perdiĝis antaŭ tri semajnoj.

– Kie vi perdis ĝin? **-ISM** -izmus

– Bedaŭrinde mi ne scias. **-ER** alkotóresz

– Kial vi ne havas novan legitimilon? **FOR-** tova, el-

– Ĉar mi ne havis tempon viziti urbodomon. Mi laboris multe. Dume mortis mia patro, naskiĝis mia fileto, rompiĝis mia piedo. Jen estas mia kondukrajtigilo.

## C) MI SERĈAS LABORON

– Mia nomo estas Ladislao Hegedŭs. Mi legis la hodiaŭan ĵurnalon, kaj tie mi trovis vian anonceton. Via entrepreno serĉas interpretiston de la germana lingvo.

– Jes, ni havas fabrikon (firmaon) en urbo Berlin, kie laboras hungaraj konstruistoj. Interpretisto devas helpi ilian laboron. Kial vi dezirus labori en Germanio?

– En Berlino loĝas miaj geonkloj. (Tie loĝas miaj bonaj geamikoj; tie laboras la fianĉino de mia filo.) **át, keresztül** **TRA**

– Bonvolu rakonti kelkajn vortojn pri vi. **túl, túlra (T)** **TRANS**

– Dek jarojn mi laboris en gimnazio kiel profesoro de la germana kaj angla lingvoj. Du jarojn mi laboris en turisma oficejo kiel turistgvidanto (ĉiĉerono). Mia edziĝo laboras

en gimnazio kiel profesorino. En mia libera tempo ni ŝatas ekskursi al la ĉirkaŭaĵo. Versajne ankaŭ vi konas la herbejon ekster nia urbo. Iru rekten en la strato Gellért, poste iru tra (5) la placo Tócskert. Trans (6) la rivereto loĝas mia amiko, kiu...

– Dankon. Sufiĉas. Bonvolu montri viajn dokumentojn!

---

## D) FOTOAPARATAĈO KAJ ĈIĈERONO.

– Kara Ludoviko! Mi havas grandan problemon, kiun vi povus solvi. Ĉu posttagmeze niaj grupanoj havos liberan tempon? **-AĈ** vacak, silány, ócska

– Jes, tiam mi dezirus promenadi en la urbocentro.

**-ING** tartó

– Ĉu vi povus helpi al mi? Volonte mi akompanus vin. Mi havas fotoaparaton, kaj mi devos viziti fotomagazenon. Tie mi ŝanĝigos mian filmon.

– Bone. Volonte mi helpos al vi. Ni ekiru je la dua kaj duono. Ĉu vi havas sufiĉe da mono? Mi proponas ŝanĝi ne nur vian filmon, sed eĉ vian fotoaparataĉon. (7).

– Vi pravas, sed mi promesis al mia edzino aĉeti arĝentan aŭ oran kandelington (8).

– Anstataŭ kandelingo aĉetu arĝentan ringon, tiel vi ŝparos monon, kaj vi povos aĉeti novan fotoaparaton.

**SUPER**

fölött, fölé (T)

– Tio estas bona ideo. Miaj familianoj estos tre feliĉaj, kiam ili ekvidos la novan fotoaparaton. Rigardu la ĉielon super (9) la turo de tiu preĝejo! Ĝi estas eksterordinare blua. Nepre mi eternigos tiun belan! Tiu ekskurso devas esti memorinda! Imagu, ke post dudek jaroj mi rakontos pri miaj belegaj, neforgeseblaj impresoj al miaj nepoj! For tiu ĉi fotoaparataĉo! Vivu la nova kaj moderna aparato!

– Laŭ mia opinio vi estas modernulo.

– Dankon por la komplimento.

– Tio ne estas komplimento, sed estas vero (fakto).

---

## E) PRI NIA ĈEFURBO, BUDAPEŝTO

Budaĉpeŝto estas la ĉefurbo de Hungario. Ĝi estas la plej granda urbo en nia lando. Tie loĝas pli ol du milionoj da loĝantoj. Ĝi konsistas el du partoj: Peŝt kaj Buda. Ili unuiĝis en 1872. Tra la ĉefurbo trafluas la Danubo. Super ĝi estas ok pontoj. La plej famaj estas la pontoj Elizabeta, Margit, Ĉenponto kaj Árpád. Du el ok pontoj estas nur por vagonara trafiko.

Ĝiaj vidindaĵoj estas: tri metroolinioj, Parlamentejo, Fiŝkaptista bastiono, fortikaĵo, Fortikaĵ-monto, monteto Gellért, fortikaĵo Vajdahunyad, diversaj muzeoj (ekzemple: Hungara Nacia Galerio, Nacia Muzeo, Belarta Muzeo, Artindustria Muzeo, Agrokultura Muzeo), Aquincum (ruinurbo el la romia imperio). La urbo estis koloniejo jam antaŭ dumil jaroj.

En la eleganta strato Váci oni povas aĉeti, se oni havas multe da mono. Cetere oni ŝatas tie nur promenadi.

La tiel nomata Interurba Preĝejo reprezentas kvin diversajn arkitekturajn epokojn: barokan, gotikan, romanikan, turkan kaj renesancan. El la turka epoko, kiu daŭris 150 jarojn, restis nur kelkaj banejoj kaj la turka memoraĵo, tombokapelo de Gül Baba (Patro de Rozoj).

Sur la monteto Gellért troviĝas ronda fortikaĵo, Citadelo; ĝi estis konstruita de Habsburgoj post 1849, por de tie bombardigi la urbon, se ĝi ribelus kontraŭ la subpremo.

La Jarmila Monumento troviĝas en la Placo de Herooj. Ĝi estis konstruita okaze de miljara ekzistado de Hungario en 1896.

Se oni deziras amuziĝi, oni povas viziti teatrojn, kinejojn, cirkon, la Gajan Parkon kaj la Zooparkon.

---

## F) PRI MIA PROFESIO KAJ LA SPORTO

Mi estas profesoro pri korpokulturo. Mi tre ŝatas sporti. Mi igas miajn studentojn sporti. Oni diras: en sana korpo estas sana animo. Ili gimnastikas ĉiumatene, kaj ili estas freŝaj dum la tuta tago. Tio signifas, ke la sporto aktivigas nin, kaj ni povas labori pli multe, vivi pli sane kaj gaje. Kiuj sportas regule, tiuj vivas pli longe. Miaj studentoj ŝatas gimnastiki, korbopilki, manpilki.

Sportbranĉoj estas: kuro, kuro je cent metroj, kuro je mil kvincent metroj, obstaklokuro, altosalto, longosalto, stangosalto, triobla salto, ĵeto per globo, ĵeto per martelo, ĵeto per disko, bokso, skermo, futbalo, manpilkado, korbopilkado, flugpilkado, skiado, glitkurado, gimnastiko, hokeo, biciklado, remo, lukto, naĝo, teniso, tabloteniso ktp.

Oni diras, ke en sana korpo estas sana animo. Ne forgesu tion.

---

## G) MI ŜANGĜIS LOĜEJON

A: Saluton! Mi aŭdis, ke vi ŝangĝis loĝejon. Via nova loĝejo troviĝas en la tria distrikto.

B: Vere, sed mia loĝejo estas malnova. Ĝi estis konstruita antaŭ 20 jaroj. Mia edzo kaj mi devos voki diversajn entreprenistojn (specialistojn) por plenumi fakajn laborojn. Laŭ mia opinio murfarbisto devos tapeti du ĉambrojn kaj la antaŭĉambron. Li devos farbi ĉiujn fenestrokadrojn kaj pordojn. Oni devos pargeti niajn ĉambrojn, kahelizi nian banĉambron kaj malgrandan parton de la muro ĉe la vazlavujo (lavkuvo).

A: Verŝajne tio kostos multe.

B: Bedaŭrinde. Je granda feliĉo ni ricevis du milionojn da forintoj de nia partner-ŝangĝinto. Tiu sumo sufiĉos por la renovigo de la tuta loĝejo.

A: Kie vi loĝas nun?

B: Nun ni loĝas ĉe miaj bogepatroj. Pardonu, mi devas rapidiĝi. Ĝis revido!

## H) MI ESTAS MALFELIĈA

A: Bonan tagon! Ĉu tiu loko estas libera?

B: Jes, bonvolu sidiĝi. Kien vi veturas?

A: Mi veturas al mia filo, kiu studas en la Miŝkolca Universitato. Li studas komputteknikon. Post la ŝtatekzameno li eklaboros ĉe kompanio kun limigita respondeco (k.l.r.).

B: Eble vi estas tre kontenta kaj feliĉa.

A: Ne, ĉar mia vivo estas malĝoja. Mi volis, ke mia filo iĝu kuracisto. Li finis naturkuracajn kursojn, li ŝatas zorgi pri malsanuloj, malfortuloj, tamen li iĝos komputprogramisto. En nia vilaĝo loĝas belega, ĉarma, riĉa fraŭlino – ŝi estas la filino de nia vilaĝestro –, tamen mia filo ne volas geedziĝi kun ŝi (edzinigi al si ŝin). Mi totumas ĉiusemajne, sed mi ne gajnas. Mia filino vojaĝos al Germanio por tri monatoj. Ŝi estas interpretistino. Neniam mi havas liberan tempon, ĉar mi vizitadas miajn parencojn. Mi devas diri al ili: kion ili faru, kion ili kuiru, fritu, rostu, baku, kiam ili aĉetu novan loĝejon. Ĉiutage de frua mateno ĝis malfrua vespero mia edzo laboras en nia ĝardeno, kaj li ne volas konversaciadi kun mi. Do mi havas treege multege da problemoj! Ekdoloras min mia kapo. Mi havas kaptumiĝon.

B: Pardonu! Mi havas vomemon. Mi devas eliri el la kupeo.

A: Restu ankoraŭ por kelkaj minutoj. Mi dezirus rakonti al vi, ke...

# GRAMATIKO KAJ STILISTIKO

1. **HÁTRA(FELÉ), VISSZA.** A retro- előképző viszonylag kevés szóban fordul elő: *retroiri visszafelé menni, retroaktiva visszaható (hatályú), retroaktiveco visszaható erő (jelleg), retrokuplo visszakapcsolás, retrospegulo visszapillantó tükör, retrospektiva (a múltba) visszatekintő.*

2. **EL-, TÁVOL.** A for- előképzővel használatos szó: *fordirekti elirányítani, forigi eltávolítani, foriri elmenni, forflui elfolyani, forflugi elrepülni, foreco távollét, forĵetaĵo hulladék; for de tie el innen, fora távoli, fore távol, messze.*

3. **-ISM, -IZMUS.** 1. Tan vagy rendszer hirdetője (híve) alapján létrejött eszmerendszer: *marksismo marxizmus, mahometanismo mohamedán vallás, kristanismo kereszténység; 2. valamely eszme tana vagy rendszere: spiritismo spiritizmus, kapitalismo kapitalizmus, komunismo kommunizmus; 3. szokás: alkoholismo alkoholizmus.*

4. **APRÓ RÉSZ, ALKATÓRÉSZ. -ER.** Pano, panero – *kenyér, kenyérmorzsa, sablo, sablero – homok, homokszem, ligno, lignero – (tűzi)fa, faszilánk, polvo, polvo – por, porszem, programo, programero – műsor, műsorszám, akvo, akvero – víz, vízcsepp, mono, monero – pénz, aprópénz.*

5. **ÁT, KERESZTÜL. TRA.** Ni iras tra la ponto. *A hídon (át) megyünk. Iru tra la placo! Menj át a téren! Tra unu orelo ĝi eniras, tra dua ĝi eliras. Az egyik fülén bemegy, a másikon kimegy. Ili promenis tra la tuta nokto. Egész éjszaka sétáltak. Előképzőként: trakonekti átkapcsolni, trairi átmenni (ni trairas la ponton – átmegyünk a hídon), trairejo átkelőhely.*

6. **TÚL, TÚLRA (T). TRANS.** a) Alanyesettel: Ili loĝas trans la montoj. *A hegyeken túl laknak. Ni veturis trans la Alpoj. Átmentünk az Alpokon. b) Tárgyesettel: Li ĵetis la pilkon trans la muron. A falon túlra dobta a labdát. Li vojaĝis trans la maron. Tengeren túlra utazott. Előképzőként: transigi áttenni, transformi átalakítani.*

7. **ROSSZ, GYENGE MINŐSÉGŰ, VACAK. -AĈ.** Ĉevalaĉo gebe, domaĉo viskó, virinaĉo némbor, perszóna, rigardaĉi bambán nézni, petaĉi kunyerálni; aĉa rossz, hitvány, vacak, aĉaĵo silány holmi, vacakság, aĉiĝi rosszabbodni.

8. **TARTÓ. -ING.** A tárgynak csak egy része van benne: *kandelingo gyertyatartó, glavingo kardhüvely, plumingo tollszár, fingringo gyűszű, pendingo akasztó.*

9. **FÖLÖTT, FÖLÉ (T). SUPER.** a) Alanyesettel **fölött:** Super ni estas steloj. *Fölöttünk csillagok vannak. Super ni loĝas la familio Erdei. Fölöttünk lakik az Erdei család. (Egyes szavakban: supereco felsőbbbségi érzés, superemo fölényesség, felsőbbbség, superi felülmúlni, superulo felettes, supernatura természetfeletti, superforto túlerő, superflui túlfolyani. b) Tárgyesettel (hová? kien? kérdésre): fölé: Mi metas la libron super la kajeron. A könyvet a füzet fölé teszem.*

Baldaŭ mi finas lerni tiun libron. Mi studis la lecionojn kaj la gramatikaĵojn tre diligente, tamen mi pensas, ke mi ne scias ĉion, mi ne povas rememori precize diversajn regulojn. Mi devas lerni kaj ripeti pli diligente. Mi volus havi novajn sukcesojn en la lernado de E.

\*\*\*\*\*

## EKZERCOJ --- GYAKORLATOK

\*\*\*\*\*

### I. RESPONDU LA DEMANDOJN! VÁLASZOLJON A KÉRDÉSEKRE!

#### A) PRI LA URBO DEBRECEN

1. Kiom da loĝantoj estas en urbo Debrecen?
2. Kie situas la stepo Hortobágy?
3. Kiam Debrecen ricevis la urban titolon?
4. Kiam Debrecen estis la ĉefurbo de nia lando?
5. Kiuj vidindaĵoj de Debrecen estas rigardindaj?
6. Kion oni povas fari en la Granda Arbaro?

\*\*\*\*\*

#### B) KIO OKAZIS HIERAŬ?

1. Pri kio pensadis nia heroo?
2. Kial li ne havis legitimilon?
3. Ĉu tiu historio ŝajnas vera?

### C) MI SERĈAS LABORON

1. Kien kaj por kio iris Ladislao?
2. Kial Ladislao dezirus labori en Berlin kiel interpretisto?
3. Kion li rakontis pri li mem?

\*\*\*\*\*

### D) FOTOAPARATAĈO KAJ ĈĈERONO

1. Ĉu la ĉĉerono akompanis Ludovikon? Kial?
2. Kion Ludoviko deziris aĉeti al sia edzino?
3. Kion proponis aĉeti la ĉĉerono?
4. Kial Ludoviko volus aĉeti novan fotoaparaton?

#### II. DIRU KAJ SKRIBU ESPERANTE!

visszafelé    menni,    visszapillantó    tükör,    elirányítani,    eltávolítani,  
elmenni,    elfolyni,    távoli,    távol,    messze,    kereszténység,  
kenyérmorzsa,    homokszem,    faszilánk,    porszem,    műsorszám,  
vízcsepp,    átjáró,    felsőbbség,    felülmúlni,    felettes,    természetfeletti,  
viskó,    perszóna,    bambán nézni,    kunyerálni,    gyertyatartó, tollszár,    akasztó,  
A hídon (át) megyünk.    Egész éjszaka sétáltak.    A hegyeken túl laknak.  
Átmentünk az Alpokon.    A falon túlra dobta a labdát.    Tengeren túlra utazott.  
Fölöttünk csillagok vannak.    Fölöttünk lakik az Erdei család.    Menj át az utcán!

## I) KONSTRUIGO DE GARAĜO

- Saluton, sinjoro! Mia najbaro diris, ke vi volus konstruigi garaĝon. El kiu materialo?
- Saluton, sinjoro masonisto! Mi dezirus konstruigi mian garaĝon el brikoj.
- Se vi dezirus konstruigi garaĝon dek-kvin kvadratmetran, vi devos aĉeti minimume kvinmil brikojn, cementon, estingitan kalkon kaj sablon.
- Bone. Sed la afero estas tre urĝa. Ĉu vi povus fini ĝin dum du semajnoj?
- Tio ne eblas. Miaj kolegoj estas okupataj. Ili laboras multe. Ni povus komenci la laboron nur post du monatoj.
- Tio ne konvenas al mi. Kiom ĝi kostus?
- Ducent mil forintojn.
- Mi povus pagi al vi duoble pli multe, se vi konstruus mian garaĝon ĝis la 10-a de la sekvonta monato.
- Bone. Ni interkonsentis.

- 
1. Kiel vi opinias pri la konstruigonto de la garaĝo?
  2. Kiel vi opinias pri la masonisto?
  3. Ĉu vi konstruus tiun garaĝon al alia persono por ducent mil forintoj? Kial?
- 

## J) PRI LA PIGRA KELNERO

- Sinjoro kelnero! Mi gustumis tiun buljonon, kaj mi diras sincere, ke ĝi estas senkaraktera, sengusta, sensala kaj malvarma. Bonvolu ŝanĝi mian supon!
- Mi finis mian laboron antaŭ kvin minutoj. Mi ne povas tion fari.

– Vi respondis tre malĝentile. En tiu ĉi restoraciejo vi estas sole kelnero. Se vi ne ŝanĝos mian supon, kaj ne portos al mi varman, veran buljonon, mi iros plendi al via ĉefo.

– Pardonu min. Tuj mi portos alian buljonon.

---

1. Kiel vi opinias pri la kelnero?

2. Kion vi farus, se vi estus gasto en tiu restoracio?

---

## K) AKCIDENTO

– Halo! Saluton! Mia nomo estas Karlo Nagy.

– Saluton! Ĉi tie parolas la deĵoranto de la urba ambulanca stacio.

– Mi informas vin pri akcidento. Du aŭtoj karambolis antaŭ du minutoj. Tiu akcidento okazis ĉe la angulo de stratoj Rákóczi kaj Petőfi.

– Ĉu estas vunditoj?

– Jes, triope. Du el ili tre sangas. Mia amiko, kun kiu mi promenis, estas kuracisto.

Nun li donas al ili la unuan helpon.

– Ĉu ili estas en mortdangero (vividangero)?

– Bedaŭrinde mi ne povas diri.

– Tuj mi sendos ambulancan veturilon. Bonvolu ripeti vian nomon!

– Mi estas Karlo Nagy. Tuj mi reiros al la vunditoj. Eble ankaŭ mi povos helpi al mia amiko, kiu estas kuracisto.

– Dankon por la informoj. Se eblas, bonvolu resti... Ĝis la reaŭdo!

---

1. Imagu, ke vi vidis akcidenton. Bonvolu priskribi ĝin. Kio okazis?

2. Kion oni (ne) devas fari, por ke ne karambolu?

## L) ĈE LA KASO

– Mi volus aĉeti bileton por la morgaŭa vespera prezentado. Ĉu vi havas biletojn?

– Jes, mi havas multajn biletojn.

– Mi petas bileton en la sesan vicon centren.

– Vi devas pagi 1600 forintojn.

– Mi vidas, ke vi vendas koncertbiletojn de fama angla ensemblo. La koncerto estos post kelkaj tagoj, la 15-an, kaj vi havas tre multajn biletojn. Ĉu oni ne interesiĝas pri tiu koncerto?

– Bedaŭrinde ne, ĉar samtempe en nia urbo estos tri aliaj grandaj aranĝoj.

1. Kial vi (ne) ŝatas viziti koncertojn, teatron, kinejon?

2. Kion vi faras anstataŭe?

IV. SKRIBU PO DU FRAZOJN PER SEKVAJ PREPOZICIOJ! KIE EBLAS UZU AKUZATIVON! ĜUSTIGU KĈE DU MONDATOT A KĈVETKEZĈ ELĈLJĀRĈSZAVAKKAL! AHOL LEHET, HASZNĀLJON TĀRGYESETET! (HOVĀ? – KIEN?)

PER

MALANTAŬ

AL

ANSTATAŬ

ANTAŬ

APUD

ĈE

ĈIRKAŬ

DA

DE

DUM

EKSTER

EL

EN

ĜIS

INTER

JE

KONTRAŬ

KROM

KUN

LAŬ

MALGRAŬ

POR

PRO

POST

PRETER

PRI

SEN

PO

SUB

SUPER

SUR

TRA

TRANS

V. SKRIBU PO TRI VORTOJN PER SEKVAJ PREFIKSOJ KAJ SUFIKSOJ!

DIS-

EK-

EKS-

FI-

FOR-

GE-

MAL-

MIS-

PRA-

RE-

RETRO-

-AC

-AD

-AJ

-AN

-AR

-CJ

-EBL

-EC

-EG

-EJ

-EM

-END

-ER

ESTR

-ET

-ID

-IG

-IG

-IL

-IN

-IND

-ING

-IST

-NJ

-UL

-UM

-ISM

-OP

-OBL

-ON

-UJ



## FONTOS KIFEJEZÉSEK ÉS MONDATOK

1. Bonvolu ripeti! Kérem, ismételje meg!
2. Kiel oni diras Esperante (hungare) la vorton „zizelo” (ürge)? Hogyan mondják eszperantóul (magyarul) „ürge” („zizelo”)?
3. Bedaŭrinde mi ne povas rememori la vorton „zizelo” (ürge). Sajnos nem jut eszembe az „ürge” szó.
4. Tio estas bona ideo. Ez jó ötlet.
5. Laŭ mia opinio véleményem szerint, laŭ mi szerintem, mi pensas, ke... gondolom, hoky..., Mi supozas, ke... Feltételezem, hoky...
6. Koran dankon por viaj informoj. Köszönöm az információkat.
7. Tie estas amaso da homoj. Sok ember van ott.
8. En libera tempo mi ŝatas rigardi televidprogramojn, aŭskulti radion, legi gazetojn pri diversaj temoj (ekzemple pri naturo, historio, biologio, familiaj aferoj, politiko ktp.). Szabadidőmben szeretek tévét nézni, rádiót hallgatni, újságot olvasni különböző témákról (például természetről, történelemről, biológiáról, családi dolgokról, politikáról stb.).
9. Mi deziras al vi ĉion bonan. Minden jót kívánok neked.
10. Mi preferas gratenitan porkaĵon al patkuko kun kazeo. Jobban szeretem a rántott húst, mint a túrós palacsintát.
11. Mi estas tre dankema. Nagyon hálás vagyok.
12. Mi havas grandan problemon, kiun vi povus solvi. Van egy nagy problémám, amit meg tudnál oldani.
13. Ĉu mi povus helpi al vi? Segíthetnék neked?
14. Oni vivas ne por manĝi, sed oni manĝas por vivi. Nem azért élünk, hogy együnk, hanem eszünk, hogy éljünk.
15. Mi estas je via dispono. Rendelkezésére állok.
16. Tio ne gravas. Nem fontos (nem lényeges, nem baj).
17. Tio estas eksterordinara situacio. Ez rendkívüli helyzet.
18. Dankon por la komplimento. Köszönöm a bókot.
19. Tio ne estas komplimento, sed estas vero. Ez nem bók, hanem ez az igazság.
20. Tio sufiĉas. Ennyi elég. Ĉio estas en ordo. Minden rendben van.
21. Resaniĝu rapide! Gyógyulj meg gyorsan!
22. Koran dankon por via helpo. Nagyon köszönöm a segítségét.
23. Kion vi proponas? Mit ajánl?
24. Mi invitas vin por vespermanĝi. Meghívlak vacsorára.
25. Mi devas labori multe en mia laborejo. Sokat kell dolgoznom a munkahelyemen.
26. Mia laboro estas interesa, sed laciga. A munkám érdekes, de fárasztó.
27. Esperanto estas facila, interesa kaj simpla lingvo. Az eszperantó könnyű, érdekes és egyszerű nyelv.
28. Kiel oni diras Esperante? Hogyan mondják eszperantóul?
29. Kiom jara vi estas? Kiom da jaroj vi havas? Kiom aĝa vi estas? Hány éves vagy? Mi estas 23 jara. (Mi havas 23 jarojn.)
30. Kiam vi naskiĝis? Mikor született?
31. Mi naskiĝis la 6-an de oktobro 1972. 1972. október 6-án születtem.
32. Miaj gepatroj estas junaj, simpatiaj, saĝaj, altaj, laboremaj, inteligentaj kaj modernaj. A szüleim fiatalok, szimpatikusak, magasak, szorgalmasak, intelligensek és modernek.
33. Tiu urbo estas tiel bela, kiel fabelo. Ez a város meseszép.

34. Mi preferas mangi fruktojn ol trinki alkoholajojn. Jobban szeretem a gyümölcsöt, mint a szeszes italt.
35. En libera tempo mi interparoladas kun miaj geamikoj pri diversaj, interesaj temoj, ekzemple pri niaj samklasanoj, familianoj, politikistoj, sportistoj, aktoroj, kantistoj ktp. Szabadidőmben a barátaimmal különböző érdekes témákról beszélgetek, például az osztálytársainkról, családtagokról, politikusokról, sportolókról, színészekről, énekesekről stb.
36. Mi estas 170 centimetrojn alta kaj 67 kilogramojn peza. 170 centiméter magas és 67 kiló vagyok.
37. Mi dezirus konatigi kun vi. Szeretnék önnel megismerkedni.
38. Mi estas hungar(in)o. Magyar vagyok.
39. Ĉu vi parolas Esperante? Ĉu vi komprenas Esperante? Beszél ön (ért ön) eszperantóul?
40. Permesu prezenti min. Permesu, ke mi prezentu min. Engedje meg, hogy bemutatkozzam.
41. Tio estas mia sekreto. Ez az én titkom.
42. Pardonu! Bocsánat! Pardonu, ke mi ĝenas vin. Bocsánat, hogy zavarom.
43. Mi tre bedaŭras. Nagyon sajnálom.
44. Bedaŭrinde mi ne havas liberan tempon. Sajnos nincs szabadidőm.
45. Jen estas mia legitimilo (pasporto). Íme a személyi igazolványom (az útlevelem).
46. Kiel ĝi kostas? Mennyibe kerül?
47. Kiel vi fartas? Hogy van. Dankon, mi fartas bone. Köszönöm jól vagyok.
48. Bonvolu transdoni miajn salutojn al viaj gepatroj kaj geavoj. Kérem adja át üdvözetemet szüleinek és nagyszüleinek.
49. Vi pravas. Önnek igaza van.
50. Pardonu, ke mi malfruiĝis. Bocsánat, hogy elkéstem.
51. Mi konsentas kun vi. Egyetértek veled.
52. Mi tre ĝojas. Nagyon örülök.
53. Resaniĝu! Gyógyulj meg!
54. Mi gratulas vin okaze de via naskiĝtago. Gratulállok születésnapod alkalmából.
55. Mi eraris. Tévedtem. (Hibáztam.)
56. Laŭ mia horloĝo estas la oka. Az óráam szerint nyolc óra van.
57. Kia estis la vetero hieraŭ? Milyen idő volt tegnap?
58. Kie estas la plej proksima vendejo? Hol van a legközelebbi üzlet?
59. Turnu vin dekstren, poste iru rekten! Forduljon balra, aztán menjen egyenesen!
60. Kiel mi atingos la placon Petőfi? Hogyan jutok el a Petőfi térre?
61. Pardonu, mi miskomprenis vin. Bocsánat, félreértettem önt.
62. Mi estas tre scivola. Nagyon kíváncsi vagyok.
63. Mi tre ĝojas, ke vi alvenis. Nagyon örülök, hogy eljöttél.
64. Mi preferas hungarecajn mangajojn. A magyaros ételeket jobban szeretem.
65. Imagu! Képzeld el!

Az alábbi mondatban legalább 40 eszperantó nyelvtani elem és szó van. Melyek ezek?

TEGNAP ESTE ENCI ADOTT NÉKEM EGY ISTOPIRINT, DE NEM HASZNÁLT.

VII. VORTARETO. LERNU SEKVAJN VORTOJNI! TANULJA MEG A KÖVETKEZŐ SZAVAKAT!

retro vissza-, hátrafelé  
for- el-, tova  
-ism -izmus  
-er részecske  
tra át, keresztül  
trans túl, túlra (T)  
super fölött, fölé (T)  
loĝanto lakos  
ĉefurbo főváros  
stepo puszta  
flui folyini  
retrorigardi visszatekinteni  
elstara kiemelkedő  
liberiĝbatalo szabadságharc  
registaro kormány  
mi mem (saját)magam  
gvidi (T) vezetni  
transloĝigi átköltözni  
sama ugyanaz  
preĝejo templom  
oro arany  
zoologia ĝardeno állatkert  
skulptaĵo szobor  
verkisto író, költő  
verki (T) alkotni  
impoza impozáns  
ekonomio közgazdaság  
natursciencoj természettudo-  
mányok  
filozofisciencoj bölcsészettu-  
dományok  
medicino orvostudomány  
okazi történni  
foriri elmenni  
entrepreni vállalkozni  
legitimilo személyi igazolvány  
policano rendőr  
polico rendőrség  
morti meghalni  
vekiĝi felébredni  
anonci (T) hirdetni  
interpretisto tolmács  
praktiki (T) gyakorolni  
turistgvidanto, ĉiĉerono idegen-  
vezető  
rekte egyenesen  
suŝas elegendő, elég  
fotoaparato fényképezőgép  
fotoaparataĉo vacak fényképe-  
zőgép  
ŝanĝi (T) cserélni, beváltani  
(valutát)  
arĝento ezüst  
oro arany, firmao cég  
kandelingo gyertyatartó  
ringo gyűrű  
ŝpari (T) takarékoskodni  
vivi élni  
retrospiegulo visszapiillantó  
tükör  
retrospektiva a múltba vissza-  
tekintő  
retrokuplo visszakapcsolás  
retroaktiva visszaható (hatályú)

retroaktiveco visszaható erő  
forigi (T) eltávolítani  
fordirekti (T) elirányítani  
foriri elmenni  
forflui elfolyini  
forflugi elrepülni  
foresto távollét  
forĵetaĵo hulladék  
fora távoli  
fore távol, messze  
sabio homok  
sablero homokszem  
ligno (kivágott) fa  
lignero forgács  
polvo por  
polvero porszem  
akvero vízcsepp  
panero morzsa  
trakonjekti (T) átkapcsolni  
trairi átmenni  
ĵeti (T) dobni  
pilko labda  
virinaĉo némbér  
rigardaĉi bambán nézni  
ĉevalaco gebe  
domaĉo viskó  
aĉa vacak, rossz  
plumingo tollszár  
fingringo gyűszű  
pendingo akasztó  
super fölött, fölé (T)  
supernatura természetfeletti  
superforto túlerő  
superflui túlfolyini  
superi (T) felülmúlni  
superuio felettes  
superemo fölényesség  
heroo hős  
briko téglá, estingita kalko oltott  
mész  
urĝa sürgős  
konveni (al) megfelei  
masonisto kőműves  
kelnero pincér  
gustumi (T) megkóstolni  
buljono erőleves  
senkarakter a jellegtelen  
plendi panaszt tenni  
akcidento baleset  
ambulanca stacio mentőállo-  
más  
angulo (utca)sarok  
vundito sebesült, sérült  
vivdanĝera, mortdanĝera élet-  
veszélyes  
ambulanca veturilo mentőkocsi  
prezentado bemutatás, előadás  
(színházban)  
projekcio előadás (moziban)  
lekcio előadás (egyetemi)  
preleĝo előadás (alkalmi)  
vico sor, li mem őnmaga  
ensemblo együttes  
samtempe ugyanakkor

herbo fű, gentila udvarias  
herbejo tisztás, rét  
sportbranĉo sportág  
kuro futás  
obstaklokuro akadályfutás  
altosalto magasugrás  
longosalto távolugrás  
stangosalto rúdugrás  
triobla salto hármassugrás  
ĵeto per globo súlylökés  
ĵeto per martelo kalapácsvetés  
ĵeto per disko diszkoszvetés  
bokso ökölvívás  
skermo vívás  
futbalo futball  
manpilkado kézilabda  
korbopilado kosárlabda  
flugpilado röplabda  
skiado síelés  
glikurado korcsolyázás  
gimnastiko torna  
hokeo jégkorong  
biciklado kerékpározás  
remo evezés  
lukto bírkózás  
naĝo úszás  
teniso tenisz  
tabloteniso asztalitenisz  
forĝesi (T) elfelejteni

pigra lusta  
tapeto tapéta  
tapeti tapétázni  
ŝanĝi loĝejon lakást cserélni  
fenestrokadro ablakkeret  
distrikto kerület  
specialisto szakember  
murfarbisto szobafestő  
voki (T) hívni  
kahelo csempe  
kahelizi csempézni  
pargeto parketta  
pargeti (T) parkettázni  
vazlavujo, lavvuvo mosogató  
ŝtata ekzameno államvizsga  
edzinigi (T) al si feleségül venni  
geedziĝi kun feleségül venni  
naturkuracisto természetgyó-  
gyász  
naturkuracada kurso termé-  
szetgyógyász tanfolyam  
doloras min mia kapo fáj a  
fejem  
vomemo hányinger  
kapturniĝo fejfájás  
interpretisto tolmács  
kompanio kun limigita respondeco  
korlátolt felelősségű társaság  
(kft.)  
brako kar  
kondukrajtigilo jogosítvány

# AZ EGYSZERŰ SZAVAK TÁBLÁZATA

I-	határozatlanság
KI-	kérdés
TI-	rámutatás
ĈI-	összesítés
NENI-	tagadás

1. Az összetett mondatokban kötőszói szerepben használatos vonatkozó névmások és a kérdő névmások az eszperantóban egybeesnek: KIU ki, aki; KIA milyen, amilyen; KIAM mikor, amikor stb.

2. Tagmondatok kezdetén vonatkozó névmások használatakor a hogy kötőszó elmarad: Mi ne scias, kiam li revenos. Nem tudom, (hogy) mikor jön vissza.

3. Az eszperantóban csak egyszeres tagadás van: Neniu alvenis. Senki sem jött el.

4. A közelre mutató szócska (ĈI) állhat a szó előtt és után is: ĉi tio, tio ĉi, tie ĉi, ĉi tie. A többi rámutatást jelölő szóval a ĈI általában nem használatos.

5. Az AJN szócska a táblázati szavak után kerül: kio ajn bármi, kie ajn bárhol, kia ajn bármilyen, kiu ajn akárki, ĉies ajn akárkié, bárkié stb.

6. Az -U végű szavak nem csak személyekre vonatkozhatnak. Kijelölő szerepük van. Meghatározott tárgyakra és fogalmakra is rámutatnak: TIU libro az a könyv, en TIU domo abban a házban, en KIU tago? melyik napon?, ĈIUtage mindennap.

		1. 2.		3.	
Meghatározott személy (tárgy)	IU valaki	KIU melyik, ki	TIU az az. az a 4.	ĈIU mindenki	NENIU senki
Tárgy	IO valami	KIO mi	TIO az 4.	ĈIO minden	NENIO semmi
Mínőség	IA valamilyen	KIA milyen	TIA olyan	ĈIA mindenféle	NENIA semmilyen
Hely	IE valahol	KIE hol	TIE ott 4.	ĈIE mindenütt	NENIE schol
Idő	IAM valamikor	KIAM mikor	TIAM akkor	ĈIAM mindig	NENIAM soha
Ok	IAL valamiért	KIAL miért	TIAL azért	ĈIAL mindenért	NENIAL semmiért
Mód	IEL valamiképp	KIEL hogyan, mint	TIEL olyan, úgy	ĈIEL mindenképp	NENIEL semmiképp
Mennyiség	IOM valahány	KIOM mennyi	TIOM annyi	ĈIOM mindannyi	NENIOM semennyi
Birtokias	IES valakié	KIES kié	TIES azé	ĈIES mindenkié	NENIES senkié

## ENHAVO – TARTALOM

<b>BEVEZETÉS</b>	3	▪	Az én tízparancsolatom	4	▪	<b>ELSŐ LECKE</b>	5	▪	Nyelvtan	8	▪	Gyakorlatok	10	▪	<b>MÁSODIK LECKE</b>	12	▪	Nyelvtan	13	▪	Gyakorlatok	14	▪	<b>HARMADIK LECKE</b>	16	▪	Nyelvtan és stilisztika	18	▪	Gyakorlatok	19	▪	<b>NEGYEDIK LECKE</b>	23	▪	Nyelvtan és stilisztika	27	▪	Gyakorlatok	29	▪	<b>ELSŐ SZINTFELMÉRŐ DOLGOZAT A)</b>	34	▪	<b>ELSŐ SZINTFELMÉRŐ DOLGOZAT B)</b>	36	▪	<b>ÖTÖDIK LECKE</b>	38	▪	Nyelvtan és stilisztika	45	▪	Gyakorlatok	48	▪	<b>HATODIK LECKE. El mia taglibro</b>	51	▪	Nyelvtan és stilisztika	54	▪	Gyakorlatok	56	▪	<b>HETEDIK LECKE. A)</b>	Kion oni faras en urbo Debrecen?	61	▪	<b>B)</b>	Pri urbo Debrecen kaj pri la hungaroj	62	▪	<b>C)</b>	Kial vi malfruiĝis?	62	▪	Nyelvtan és stilisztika	63	▪	Gyakorlatok	64	▪	<b>D)</b>	Mendo de ĉambro en hotelo	66	▪	<b>NYOLCADIK LECKE. A)</b>	Aŭtobiografio	68	▪	<b>B)</b>	Ekskurso	69	▪	Nyelvtan és stilisztika	70	▪	Gyakorlatok	70	▪	<b>C)</b>	La vizo	73	▪	<b>D)</b>	Hungarecaj manĝaĵoj	74	▪	<b>MÁSODIK SZINTFELMÉRŐ DOLGOZAT A)</b>	76	▪	<b>MÁSODIK SZINTFELMÉRŐ DOLGOZAT B)</b>	81	▪	<b>KILENCEDIK LECKE. A)</b>	Kion oni povas fari en libera tempo (libertempo)?	85	▪	<b>B)</b>	Pri nia domo	86	▪	<b>C)</b>	Pri nia ĝardeno	87	▪	Nyelvtan és stilisztika	87	▪	Gyakorlatok	88	▪	<b>D)</b>	Hazarda renkontiĝo	92	▪	<b>E)</b>	Malfunkciis la hejtado	93	▪	<b>F)</b>	Invito al vespermanĝo	94	▪	<b>TI-ZEDIK LECKE. A)</b>	Helpu al mi!	97	▪	<b>B)</b>	Oni vivas ne por manĝi...	98	▪	<b>C)</b>	Interparolado de ĉefo kun sia kolego	98	▪	<b>D)</b>	Pri la morgaŭa vetero	99	▪	<b>E)</b>	En aŭtobuso	100	▪	Nyelvtan és stilisztika	100	▪	Gyakorlatok	103	▪	<b>F)</b>	Ĉu vi konas tiun rabiston?	104	▪	<b>Ĉu vi povus helpi al mi?</b>	105	▪	<b>TIZE-NEGYEDIK LECKE. A)</b>	Sendanĝereco kaj asekuro	111	▪	<b>B)</b>	Ĉu Georgo estas fiviro?	112	▪	Nyelvtan és stilisztika	113	▪	Gyakorlatok	114	▪	<b>C)</b>	Mendo de varoj	121	▪	<b>D)</b>	Ĉu la valizo perdiĝis vere?	121	▪	<b>E)</b>	Pri aŭtobusbiletoj kaj malfruiĝo	122	▪	<b>TIZENKETTEDIK LECKE. A)</b>	Pri la urbo Debrecen	126	▪	<b>B)</b>	Kio okazis hieraŭ?	127	▪	<b>C)</b>	Mi serĉas laboron	127	▪	<b>D)</b>	Fotoaparataĉo kaj ĉiĉerono	128	▪	<b>E)</b>	Pri nia ĉefurbo, Budapeŝto	129	▪	<b>F)</b>	Pri mia profesio kaj la sporto	129	▪	<b>G)</b>	Mi ŝanĝis loĝejon	130	▪	<b>H)</b>	Mi estas malfeliĉa	130	▪	Nyelvtan és stilisztika	131	▪	Gyakorlatok	132	▪	<b>I)</b>	Pri konstruigo de garaĝo	134	▪	<b>J)</b>	Pri la pigra kelnero	134	▪	<b>K)</b>	Akcidento	135	▪	<b>L)</b>	Ĉe la kaso	136	▪	Az egyszerű szavak táblázata	142	▪	Tartalomjegyzék	143
------------------	---	---	------------------------	---	---	-------------------	---	---	----------	---	---	-------------	----	---	----------------------	----	---	----------	----	---	-------------	----	---	-----------------------	----	---	-------------------------	----	---	-------------	----	---	-----------------------	----	---	-------------------------	----	---	-------------	----	---	--------------------------------------	----	---	--------------------------------------	----	---	---------------------	----	---	-------------------------	----	---	-------------	----	---	---------------------------------------	----	---	-------------------------	----	---	-------------	----	---	--------------------------	----------------------------------	----	---	-----------	---------------------------------------	----	---	-----------	---------------------	----	---	-------------------------	----	---	-------------	----	---	-----------	---------------------------	----	---	----------------------------	---------------	----	---	-----------	----------	----	---	-------------------------	----	---	-------------	----	---	-----------	---------	----	---	-----------	---------------------	----	---	---	----	---	---	----	---	-----------------------------	---	----	---	-----------	--------------	----	---	-----------	-----------------	----	---	-------------------------	----	---	-------------	----	---	-----------	--------------------	----	---	-----------	------------------------	----	---	-----------	-----------------------	----	---	---------------------------	--------------	----	---	-----------	---------------------------	----	---	-----------	--------------------------------------	----	---	-----------	-----------------------	----	---	-----------	-------------	-----	---	-------------------------	-----	---	-------------	-----	---	-----------	----------------------------	-----	---	---------------------------------	-----	---	--------------------------------	--------------------------	-----	---	-----------	-------------------------	-----	---	-------------------------	-----	---	-------------	-----	---	-----------	----------------	-----	---	-----------	-----------------------------	-----	---	-----------	----------------------------------	-----	---	--------------------------------	----------------------	-----	---	-----------	--------------------	-----	---	-----------	-------------------	-----	---	-----------	----------------------------	-----	---	-----------	----------------------------	-----	---	-----------	--------------------------------	-----	---	-----------	-------------------	-----	---	-----------	--------------------	-----	---	-------------------------	-----	---	-------------	-----	---	-----------	--------------------------	-----	---	-----------	----------------------	-----	---	-----------	-----------	-----	---	-----------	------------	-----	---	------------------------------	-----	---	-----------------	-----